




GVIDLIBRO DE LA
III IBERIA KONGRESO ESPERANTISTA K - 1925 -
KORDOVO





III^A IBERIA KONGRESO ESPERANTISTA

KORDOVO, 10 - 12a de Majo 1925



Federación Española de Esperanto
Hispana Esperanto - Federacio

Rodríguez San Pedro 13 - 3^o - 7, E-28015 MADRID
Tel. +34 - (9)1 - 4458079

KONGRESLIBRO

SAMTEMPE GVIDILO TRA ANDALUZIO





ELDONITA

DE LA ORGANIZA KONGRESA KOMITATO

KORDOVO, 1925

Presejo LA PURITANA





DOKTORO L. L. ZAMENHOF

Aŭtoro de Esperanto

Naskiĝis 15 decembro 1859.

Mortis 14 aprilo 1917.

KONGRESA KOMITATO

Honora prezidanto: S-RO PABLO LINARES RAPET

Prezidanto . . . » FRANCISCO SERRANO OLMO

Kasisto. . . . » JUAN SERRANO OLMO

Sekretario. . . » JOSÉ BERGER KNOLL

Voëdonantoj . S-OJ FRANCISCO AZORIN IZQUIERDO

ROGELIO LUQUE DÍAZ

PANTALEÓN MARIVELA SANZ

Por blindulaj aferoj: F-INO ANA MEJIAS ROMÁN

III^a IBERIA
KONGRESO
ESPERANTISTA



ORGANIZA
KONGRESA
KOMITATO



SRO. PABLO LINARES RAPET
Honora Prezidanto

SRO. JOSEPH BERGER
Sekretario

SRO. FRANCISCO SERRANO OLMO
Prezidanto

SRO. JUAN SERRANO OLMO
Kasisto

SRO. ROGELIO LUQUE
Voĉdonanto

SRO. FRANCISCO AZORIN
Voĉdonanto

SRO. PANTALEÓN MARIVELA
Voĉdonanto

F-IND. ANA MEJÍAS ROMÁN
Por blindulaj aferoj

ANTAŬPAROLO

Kiam vi, karaj gekongresanoj, karaj gelagantoj, ekprenos per viaj manoj la jenan kongreslibron, ni petas pri viaj bonvolaj indulgo kaj nekritikemo Ni mem ja estas plene konvinkitaj, ke nian laboron akompanas multaj eraroj, multaj mankoj Perfek-teco restas ĉiam aspirinda celo, sed kiom malofte ĝi troveblas en teraj aferoj!

Kion ni povas sincere confesi estas, ke nin gvi-

dis bona volo. Sed niaj rimedoj estis sufiĉe modestaj, kaj nur dank' al helpemo kaj oferemo ni povas prezenti nian kongreslibreton. Ĝi estu por la partoprenantoj de la Kordova samideana kunveno memoraĵo pri la urbo, pri la tuta Andaluzio kun ĝia suno, ĝiaj floroj kaj ĝiaj ceteraj ĉarmoj. Por tiu al kiu io malhelpa baras la ĉeeston, ĝi estu almenaŭ rebrilo, anstataŭilo kaj interligu lin tiel spirite kun la urbo de la IIIa Iberia Kongreso Esperantista.

Por vi, ĉeestantoj, ni havas tute specialan peton: Al Kordovo estas rezervata granda tasko: la fina decido pri la definitiva organiza formo de la hispana esperantistaro. Kunhelpu ĉiu laŭforte, ĉu per promesoj poste nepre realigotaj, ĉu per valoraj sugestoj, ĉu per iaj subtenoj, ĉu—per rezigno je personaj preferoj kaj preferetoj favore al la bono kaj prospero de l' tuto. Tiam ni ne dubas, ke Kordovo signifos por la hispana esperantistaro, kion Helsinko por la tutmonda: la definitiva solvo de grava organiza problemo.

Restas al ni nur, diri niajn dankojn al ĉiuj ali-

ĝintoj kaj esprimi niajn siucerajn dezirojn, ke ĉiu
trovu en Kordovo, krom la loka beleco ĉarmigi-
ta per granda historia pasinteco, la varman, pul-
santan vivon modernan de homare sentanta po-
poletoj.

L. K. K.



KONGRES-PROGRAMO

Sabato 9^a de majo:

Dumtage alveno de la gekongresanoj.

VESPERE: Interkonatiĝa kunveno.

Dimanĉo 10^a de majo:

MATENE: Solena malferma kunsido.

POSTTAGMEZE: Ekskurso en la montaron.

VESPERE: Amuzoj.

Lundo 11^a de majo:

MATENE: 2^a laborkunsido.

POSTTAGMEZE: Vizito al la urbo, Moskeo kaj muzeoj.

VESPERE: 3^a laborkunsido.

Mardo 12^a de majo:

MATENE: Ferma kunsido.

POSTTAGMEZE: Ekskursoj

Merkredo 13^a de majo:

Ekskurso al Sevilla.

Ĵaŭdo 14^a majo:

Ekskurso al Granada.

SCIIGOJ

AKCEPTEJO

Strato Ambrosio de Morales, 10 (Oficejo de F. Serrano Olmo)

KONGRESEJO

Rondo «Círculo de la Amistad» Strato Alfonso XIII.

EKSKURSOJ estos aranĝataj kelkaj en la ĉirkaŭaĵon de la urbo. La partoprenantoj nur devas pagi la elspezon por la veturilo.

EKSPOZICIO

Estos malfermita dum la tula kongressemajno.

Post la kongreso okazos ekskurso al

a) SEVILLA:

La 13an de majo. Forveturo je la 7,25. Prezoj de la fervojo por iro kaj reveno: IIa klaso 18,65 ptj.; IIIa 11,25 ptj.

b) GRANADA:

La 14an de majo per aŭtomobilo. Prezo por iro kaj reveno proks. 50 ptj.

Ciuj partoprenantoj bonvolu sin enskribi dum la 1.^a kongrestago en la akceptejo.

POŝTKARTOJ Estas eldonitaj serioj da poŝtkartoj kun vidaĵoj de Kordovo kaj esperanta teksto. Ili estas riceveblaj en la akceptejo. Aĉetu ilin!

HORTABELO DE LA PLEJ GRAVAJ VAGONAROJ

El Kordovo al Madrido

EKSPRESA

1^a, 3a kl. Eliras je 12,12, alvenas je 21,30
» » 0,15, » » 10,35

POŝTA

» » 16,15, » » 7,10

El Madrido al Kordovo

EKSPRESA

1^a, 3a kl. Eliras je 10,00, alvenas je 18,55
» » 17,15, » » 3'45

POŝTA

» » 21,00, » » 10,30

El Kordovo al Seviljo

EKSPRESA

1^a, 3a kl. Eliras je 19,00, alvenas je 21,40

POŝTA

» » 10,10, » » 15,00

MIKSITA

» » 7,00, » » 10,45

El Seviljo al Kordovo

EKSPRESA

1^a, 3a kl. Eliras je 9,25, alvenas je 12,06

POŝTA

» » 12,10, » » 15,50

MIKSITA

» » 18,00, » » 21,40

El Kordovo al Malago

EKSPRESA

1^a, 3a kl. Eliras je 6,30, alvenas je 10,50

POŝTA

» » 11,15, » » 18,00

El Malago al Kordovo

EKSPRESA

1^a, 3a kl. Eliras je 17,30, alvenas je 22,25

POŝTA

» » 9,00, » » 15,55

El Kordovo al Granado

EKSPRESA

1^a, 3a kl. Eliras je 6,20, alvenas je 12,23

POŝTA

» » 11,15, » » 19,45

El Granado al Kordovo

EKSPRESA

1^a, 3a kl. Eliras je 16,10, alvenas je 22,39

POŝTA

» » 8,10, » » 15,55

NOTOJ

ANDALUZIO




ANDALUZIO, LA ĈARMA REGIONO

En la suda parto de Hispanio, kie la suno brilas plej hele kaj la floroj montras siajn plej belajn kolorojn, inter la parfumoj de la oranĝarboj kaj sub unu el la plej bluaj ĉieloĵ kiujn oni povas rigardi tra irante la tutan mondon, estas Andaluzio, regiono de nekomparebla ĉarmo, de radiantaj festoj, de ensorĉigaj knabinoj nigrokulaj; teritorio de gravegaj historiaj epizodoj el antikva kaj meza epokoj.

Inter Portugalio, Ekstremadura, Kastila kaj Levantina regionoj kaj la maroj Atlantiko kaj Mediteraneo, trapasita de la riveroj Guadalkivir, Guadiana, Genil kaj aliaj pli malgrandaj, sed ĉiuj interesaj, ĉiuj enkadrataj de belegaj mirindaj pejzaĝoj, kiel arĝentaj rubandoj sur sorĉa, verda, velura tapiso, Andaluzio, lando de belulinoj kaj de floroj, de poetoj kaj de birdoj, de kantoj kaj de revoj, prezentas al vizitantoj grandajn ĉarmojn per siaj jenaj ok provincoj:

ALMERÍA (ALMERIO)



ALMERIO — Ĝenerala vidaĵo


Ĝi havas moderan klimaton rekomendindan por la vintro; ĝiaj belaj ĝardenoj kaj promenejoj, la tre oportuna bandomo, malfermita dum la tuta jaro, allogas ĉiujn kiuj vizitas la urbon. En ĉi tiu estas ankaŭ, kiel la plej interesaj, la jenaj konstruaĵoj:

Katedralo, seminario, episkopa palaco, urbestrejo, poŝto-ficejo, monaĥinejo kaj kelkaj preĝejoj.

En la havenon povas eniri ĉiaj ŝipoj; la eniro estas tre kapabla; ĝi havas du gravajn albordejojn por sia tre senhalta komerca movado.

Vizitante ĉi tiun urbon ĉiuj trovas la belecojn de ĝiaj stratoj, preskaŭ ĉiuj, grandparte, asfaltitaj.

Almerio havas fruktodanajn kampojn kiuj produktas vinberojn, oranĝojn, migdalojn, k. t. p.; ankaŭ ferajn kaj plum-bajn mineralejojn.




ALMERIO.—La urbo vidata de la haveno




ALMERIO.—Promenejo Principe Alfonso

CADIZ (KADIZO)

Kun fortikaĵoj kaj preskaŭ ĉiufanke banita de la oceano, ĝi estas kunligita tere per mallarĝa istmo.




KADIZO.—Ĝenerala vidaĵo kun la maro



KADIZO —Lago kaj Groto de la Genova Parko

La situacio de ĝia haveno estas el la plej konvenaj por la komerco metante facilajojn por la interkomuniko kun Anglio, Portugalio, Holando, Francio, la nordaj marbordoj de Germanio, kaj, precipe, Afriko kaj Ameriko.

Kadizo, krom ĝiaj kvin havendigoj, havas bonajn konstruaĵojn kiuj donas al la urbo intereson por ĉiuj.




JEREZO (KADIZO).—Galerio en la Monaĥejo (Cartuja)



JEREZO (KADIZO).—Enirpordego al la Monaĥejo, grek romana stilo. 1571.

Estas vidindaj: la nova katedrado, kun riĉaj marmoroj kaj artaĵoj, la limimpostejo, urbestrejo, malsanulejo, malliberejo, tabakfabriko, kaj kelkaj preĝejoj inter kiuj estas tiu de S. Filipo kie kunsidis, en la jaro 1812, la reprezentantoj de la Nacio por legdoni la fundamentan Konstitucion.

Kadizo estas bela urbo, tre vizitata ĉiusezone, al kio ankaŭ invitas la bona varmeta vetero kiun oni ĝuas en ĝi.



JEREZ (KADIZO).—Bela loko en la historia rivereto «El Salado»

HUELVA (HÜELVO)

La haveno de Huelvo estas la tria el ĉiuj hispanaj; kaj tio donas al la urbo grandan intereson por la komerco kaj por la ĝeneralaj ekonomiaj vivmanieroj.

Ĉiuj publikaj riĉaĵoj pligrandiĝas senĉese, de kiam la enfluejaj golfetoj de Odiel kaj de Tinto favoras ilin. En la bela golfeto estas la metalaj albordejoj de la grava kaj konata Kompanio de Riotinto.

Ĝi havas ankaŭ gravajn urbajn konstruaĵojn, inter kiuj meritas esti speciale citataj la stacidomo de Sevilo, arabstila, promenejoj kaj kelkaj placoj kaj stratoj.

La provinca de Huelvo produktas vinojn kaj mineralojn kiujn oni eksportas en tre malproksimajn lokojn.



HÜELVO.—Placo de l' Mayas



JAENO.—Eksteraĵo de la Katedralo

JAEN (JAENO)

Urbo bele lokita sur malgranda deklivo de monto nomita Kastelo; pentrinda bildo kiun oni povas admiri de kelkaj lokoj inter kiuj estas la ĉefa la Poplaleo.

La plej interesaj stratoj estas tiuj de Alamos, Bernabé Soriano, kaj Martínez Molina. Estas tie kelkaj belaj ĝardenoj.

Oni devas mencii la belegan katedralon, konstruitan sur la malnova moskeo. Ankaŭ estas notindaj la provincestrejo kaj la vendejhalo

La plej grandaj riĉaĵoj de Jaeno estas la cerealoj, vinoj, legumoj kaj fruktoj kaj kelkaj medicinaj kreskaĵoj


MÁLAGA (MALAGO)



MALAGO.—Strato Larios

Ĝi estas bela urbo, sur la bordo de la maro Mediteranea. Ĝia haveno estas tre vizitata kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj tre pentrindaj.

Havas Malago belegajn konstruaĵojn kaj modernajn stratojn inter kiuj meritas specialan mencion tiu de Markizo de Larios, unu el la plej belaj el Hispanio.



MALAGO.—Intermonto nomata El Chorro. Tunelo kajviaduleto

Posedas ĉi tiu andaluza urbo luksajn hotelojn, kio, krom la bona klimato, faciligas la oportunan restadon kaj, precipe dum la vintro, Malago estas preferata de multaj vojaĝantoj al aliaj vintrorestejoj.

La urbaj konstruaĵaj kiuj meritas specialan atenton estas: Katedralo, episkopa palaco, azilo por malriĉuloj, vendejhalo,




MALAGO.—Marbordo de la Malagueta



MALAGO.—Vilao Sankta Josefo

teatro Cervantes, doganejo kaj la frenezulejo, kiu estas unu el la plej bonaj el ĉiuj hispanaj.

Troviĝas tie ankaŭ belegaj promenejoj kun grandaj arboj; tiuj de Heredia kaj de la Parko havas sufiĉan gravecon por esti konsiderataj inter la plej mirindaj de la regiono kaj eĉ de la lando.




RONDO. — Araba enirpordego

GRANADA (GRANADO)


Sur la deklivo de *Sierra Nevada* (Neĝita Montaro) proksime de *Sierra Elvira*, ĉe la dekstra flanko de la rivero Genil, kaj apud la du bordoj de Darro, kuŝas Granado, eble la plej tipa andaluzia urbo.

Cirkaŭita de ĝardeno, kiu estas la fruktodona valo, Gra-



Enirejo al iu andaluza korto

nado ŝajnas paradiza loko. Unuflanke de la rivero kuŝas l' *Albaisin'* o, kvartalo kie loĝis antikve la maŭroj kaj nun preskaŭ tute okupita de ciganoj, la kvartalo de Sankta Lorenzo kaj la pliparto de la moderna loĝejaro; aliflanke la *Alhambro*, la *Generalifo* kaj malnovaj ĉirkaŭaĵoj.



Internaĵo el la katedralo de Granado

La plej antikva parto de Granado estas la *Alkazaba*, sed kio donas al la urbo tiom da famo kiom ĝi havas estas la *Alhambro*, per kiu nomo oni pli bone konas la alkaŝaron (Kastelon) de la maŭraj reĝoj, konstruitan dum la regado de Mahometo Ia (1232-1272) kaj lia filo Mahometo IIa (1272-1302) kaj kie poste Mahometo IIIa ordonis konstrui moskeon.

La katedralo, fondita de la Reĝoj Katolikaj en havas belaĵojn kiel ekz. tiujn de ĝia majesta internaĵo kaj ĝiajn belajn pordojn. Sub la Ĥorejo troviĝas absido sub kiu oni entre rigas la ĉefepiskopojn kaj kie estas enterigitaj ankaŭ Alonso Cano kaj Mariana Pineda. Ankaŭ kuŝas en ĉi tiu katedralo la reĝoj Ferdinando kaj Isabel, kiuj konkeris Granadon.

Granado havas ĝenerale mallarĝajn kaj malrektajn stratojn, kvankam ankaŭ tre larĝajn kaj modernajn stratojn; proksimume cent placojn kaj placetojn, bonajn konstruaĵojn, muzeojn, monumentojn, balzamodorajn ĝardenojn kaj altajn




GRANADANINO


Pentraĵo de Gonzalez Santos

fortikaĵojn kiuj donas al la urbo, krom la nekomparebla *Alhambro*, la senegalan ĉarmon, la superĉian sorĉon kiu faras el ĝi urbo de revo kaj de fantazio.


Tiel kiel Seviljo estas la Andaluzio de la ĝojo, Granado estas de la sento Dum unu ridas, la alia sopiras. Tia estas la urbo de la *Alhambro*.



GRANADO.—Parta vidaĵo el la Alhambro




GRANADO.—Elrigardo el la Alhambro





GRANADO.- La an-
tikva «Alhóndiga»
aũ domo de Karbo.

GRANADO
En la Alhambro.




GRANADO.—Vido al
Korto de la Leonoj en
la Alhambro.



GRANADO.—Alhambro
Alia vidaĵo.


SEVILLA (SEVILJO)

Sur vasta ebenaĵo trapasita de Guadalquivir, apud ĉi tiu poezia rivero, inter fruktkampoj ĉiuspecaj, precipe de oranĝarboj, en unu el la plej belaj lokoj de ĉi tiu regiono kuŝas Seviljo, la tiel prave nomata Reĝino de Andaluzio.



SEVILJO. — Katedralo. Pordego de la Reĝoj

Seviljo enhavas multajn ĉarmojn. Estas inter ĉi tiuj le *Alkazar'o* ĉirkaŭita de muro kun surturetoj; la Salono de Justeco en la korto de los *Monteros* (ĉasistoj), la ĉefa fasado tre mirinda, la korto de las *Doncellas* (virgulinoj) kaj tiu de las



SEVILJO — La Alcazar'o.—Korto de la Pupoj


Muñecas (pupoj), Salono de *Embajadores* (ambasadoroj), Salono de *Armas* (insignoj).

La katedralo kun sia famkonata turo, la *Giraldo* kaj belaj pordoj kaj bela internaĵo; la urbes trarejo, la Universitato, la domo de kontraktado aŭ *Lonja* (Borso) en kies supraj

etaĝoj troviĝas nun la Arĥivo de Indias (Hindioj), la tabakfabrikejo, la domo de Pilato, kaj kelkaj gravaj muzeoj.

Kiel bela ornamo de la urbo, apud la rivero, estas la historia okangula Turo de l'Oro.


Ankaŭ meritas esti vizitata la palaco de Sankta Telmo, antikva seminario.



SEVILJO.—Salono de María de Padilla kun vido al la Giraldo

Inter la artaj industrioj vere mirindaj de Seviljo (fajenco, potfabriko) okupas unuan rangon tiu lokita en la eksmonaĥejo de la *Kartuja* kiun oni devas vidi ankaŭ.

Becquer, Velazquez, Murillo, Daoiz kaj aliaj gloraj sevil-



SEVILLO.—La Bolsa

ANDALUZAJ POPOLFESTOJ EN LA KAMPARO



TIU DEL ROCÍO, EN SEVILJO

janoj havas monumentojn en la ĉefaj placoj kaj ĝardenoj de la ĉarma urbo.

Antikve Seviljo estis ĉirkaŭita de altaj muregoj el kiuj, antaŭ duono da centjaro, ankoraŭ restis dekkvin pordoj, sed preskaŭ ĉio ĉi malaperis. Nur restas hodiaŭ la turoj de l'*Alkazaro*, tiu de l'*Oro* kaj tiu de l'*Argento*, la pordoj de la *Makarena*, la pordo de l'*Oleo* kaj iom da murego romanorigina.

Havas Seviljo belegajn ĝardenojn, el kiuj estas la ĉefaj tiuj nomitaj «Parko de Maria Luĝa», tiuj de l'*Alkazaro*, al kiu tiom da historiaj memorigaĵoj rilatas.

Pligrandigas la belecon de Seviljo ĝiaj tipaj kvartaloj kiel ekzemple la nepriskribebla de la Sankta Kruco, kiel tiu de Triana kun siaj kvindek stratoj, sur la ala flanko de la rivero, kunigita kun Seviljo per bonega kaj belega fera ponto.

Seviljo estas moderna urbo kiu havas belajn kaj larĝajn stratojn sed ankaŭ multajn aliajn mallarĝajn kiuj donas al ĝi specialan ĉarmon.


Antaŭ ĉio oni vidas en Seviljo, kaj ĉi tio eltiras la simpatian atenton de ĉiuj, la gajan karakteron, la sindonemecon de ĉiuj, la neĉimiteblan graciecon de la seviljaninoj, la tipajn dancojn, la tradiciajn festojn almenaŭ dum Aprilo kaj Majo, Sankta Semajno, Ĉef-foiro, la plezuron, tiel grandan kiel nedireblan, kiu sorĉigas la vizitantojn.

Preskaŭ sen scii kial, Seviljo estas, spirite, unu el la plej belaj urboj de la mondo.



CÓRDOBA (KORDOVO)

Kordovo, la kongresurbo, estas la koro de Andaluzio. Kiel enfermita inter *Sierra Morena* (Bruna Montaro) kaj la rivero Guadalquivir, meze de la regiono, estas lokita la urbo, duaklasa, kun, proksimume, 100 000 loĝantoj. Ĝia klimato, krom dum Somero, estas tre agrabla precipe en aŭtuno kaj printempo; beleco kiel tiu de tiu ĉi lasta sezono ne estas atingita en iu alia loko de Eŭropo. Ili estas, do, la sezonoj rekomendindaj por viziti la urbon, kiun oni nomas «okcidenta sultanino».




KORDOVO. —Katedrala Turo

La ĉefaj stratoj estas: Conde de Gondomar, Claudio Marcelo, Victoriano Rivera, Duque de Hornachuelos, Conde de Cárdenas, Alfonso XIII kaj María Cristina. La ĉefaj plazoj: de Colón, de Cánovas, de Fernández Grilo.

IOM DA HISTORIO

Kiuj estis la unuaj loĝantoj de Kordovo? Oni ne scias certe; la historio komencas parolante pri ĝi dum la fenicia kaj kartaga epokoj Ĉi tiu urbo estis konkerita de la romana guberniestro Lucio Marko en la jaro 200 (antaŭ J. K.) kaj, post kelke da tempo, Klaŭdio Marcelo fondis en ĝi romanan kolonion; dum tiu ĉi epoko la graveco de Kordovo por la romana reguo en Hispanio esti eksterordinara.



KORDOVO.—Tipe andaluza Korto

En la jaro 672 alvenis en Kordovo la reĝo Leovigildo kaj de tiam la urbo komencas esti parto de la visigoda Imperio en Hispanio.


En 711 la araboj proprigis al si Kordovon kaj Abderraman I, en 756, starigis sendependan *Emiraton*.

Abderraman III diskonigis kaj disvastigis per venkaj bataloj la gravecon kaj influferon de Kordovo eĉ ĝis Egiptujo. Tiam li sin deklaras kalifo (912), ĉefo de la kreduloj.

La tempo ĝis la jaro 1002 estas la granda jarcento por Kordovo Ĝi staras ĉe la kaploko de ĉiuj tiamaj nacioj kaj rilate al potenco kaj al ĉiuarta graveco kaj tiam ĝi akiris la faman alnonon: Okcidenta sultanino.

Tiam Kordovo atingis la plimulton de sia famo estante la plej kultura el la tuta Eŭropo.

En 28 Junio 1236 la reĝo Ferdinando IIIa proprigis al si la urbon.



KORDOVO — Knabinoj plenigantaj siajn argilkrucojn ĉe la fonto de l' Oranĝuja Korto

MONUMENTOJ

LA MOSKEO-KATEDRALO.—El ĉiuj monumentoj art-arabaj, ĉi tiu estas la plej nekomparebla. Konstruita dum la plej prospera epoko de la kalifoj, oni ĉi tie disvolvis tiom da beleco kaj da arto ke la plej malgrandetaj detaloj de ĝia ornamo montras la plej pnrigitan guston kaj neimiteblan belegecon



KORDOVO —Placo de la Doloroj

KORTO DE LA ORANĜARBOJ.—Banita de la suno, balzamumita de la parfumoj de la oranĝfloroj kaj eterne aŭdiganta la kantadon de la akvo de siaj fontoj, ĉi tiu korto estas inda antaŭaĵo kiu preparas la animon por la rigardado de la mirindaĵo kiun oni serĉas, kiam oni ĉi tien venas.

ARABA KONSTRUAĴO.—Abderraman Ia, fondinto en Hispanio de la sendependa araba Imperio, komencis la primitivan moskeon en la jaro 785 (177 de la heĝiro aŭ mahometana tempkalkulo) sur la sama loko kie oni supozas ke estis antikve la preĝejo de Sankta Georgo. Tiu ĉi primitiva moskeo havis




La tipa Kordova.—«El Portillo»

nur 11 navojn, sian ĉefan pordon en la norda flanko kaj la *Mirab'on* en la loko nomita hodiaŭ *Kapelo de Villaviciosa*.

Abderraman IIa en la jaroj 833 ĝis 848 pligrandigis ĝin suden kaj tiam estis jam 20 navoj.

Poste Al-Haken IIa, dezirante ke ĉi tiu moskeo estu la plej riĉa en la mondo, ordonis konstrui la *Mirab'on*, tiel faman, kiun oni povas hodiaŭ admiri kiel ĝi estis en la arabaj tempoj.



KORDOVO — Tipa domkorto

En la jaro 987 Almanzor faris la lastan pligrandiĝon konstruante ok navojn pli en la orienta flanko.

Nun, ĝia amplekso estas 23.000 metroj kvadrataj kaj ĝi havas 856 kolonojn. La plafono montras belajn arabeskojn.


Laŭ ordono de Abderraman IIIa estis konstruita, en la sama loko kie ni vidas nun la turon, minareto kies alteco atingis nur 14 metrojn kaj kiu havis 14 *ajimez'ojn*. Tio estas nun la unua etaĝo de la turo.

1054 lampoj estis tiam interne de la moskeo; la plej granda el ĉiuj estis tiu de la *Mirab'o*.



CARMEN.—Bildo de l' Kordova pentristo León Astruc

KRISTANA REFORMO.—Oni dediĉis la moskeon por kristana templo post la konkero de Kordovo de Sankta Ferdinando; kaj, sen sufiĉa respekto por ĝia arkitektura stilo, estis faritaj grandaj transformigoj.



KORDOVO.—Stratbildo êe la Vendejhalo

Interkonsente kun la deziro de la eklezia aŭtoritato havi gotikan katedralon, estis konstruita la *crucero*. La fama arkitekturo Hernan Ruiz komencis la konstruadon, kiu estis finita, post jarcento, de lia filo. La detaloj de la Ĥorejo, tute en mahagono, havas mirindan belegecon kaj ili, kiel la predikejoj, estas la plej grandvalora faritaĵo de la eminenta artisto Petro Duque Cornejo.

KAPELOJ

Estas kelkaj kapeloj interesaj. En tiu de Sankta Lorenzo estas krucifikso de Martinez Montañez kaj malgranda parto de la primitiva plafono de la moskeo.

Kapelo de Sankta Teresina, aŭ de la Kardinalo; fondita en la jaro 1705 de la kardinalo Salazar kaj utiligita hodiaŭ kiel sakristio, kie estas belegaj pentraĵoj kaj skulptaĵoj; inter ĉi tiuj lastaj oni vidas iun tre belan kiu reprezentas Sanktan Teresinon de Jesuo, de Petro de Mena. En ĉi tiu kapelo oni gardas la altvalorajn juvelojn de la katedralo, inter kiuj estas ogiva *Custodia* de la XVI jarcento, de Henriko de Arfe, la procesia kruco, belega krucifikso en eburo de Alonso Cano, kaj kelkaj pluraj de granda arta merito.

La ĉefkapelo estas ornamita de Cesar Albacia en la jaro 1586.

ALIAJ DETALOJ DE LA MOSKEO

La gipsa absido de la plafono estas el la XVIIIa centjaro kaj hodiaŭ oni ĝin anstataŭas, iom post iom, per imitaĵoj de la antikva araba ornamo.

La turon, konstruitan sur la sama loko kie estis antikve la minareto oni riparis en la XVII kaj XVIIIa jarcentoj. De tie oni povas rigardi belan kaj grandan vidaĵon.

La pordo de la Pardonon estas el la XIVa centjaro.

La granda lampo kiun oni vidas en la *crucero* estas arĝenta kaj pezas 184 kilogramojn, oni faris ĝin en la jarcento XVIIIa.

ROMANA PONTO

Per ĉi tiu ponto komuniĝas la urbo kun la kvartalo de la *Sankta Spirito*, plej konita sub la nomo de *Kampo de la Vero*; ĝia origino estas romana sed oni rekonstruis ĝin kelkajn fojojn en la araba epoko dum la jarcentoj XIVa kaj XVa kaj laste antaŭ malmultaj jaroj.

Ĝi havas 16 arkojn diversstilajn.

TURO LA MALMUERTA

Laŭ malnova kaj popola tradicio, estis altranga ĝentilhomino kiu kolerigite pro ĵaluzoj mortigis malprave sian edzinon.



Knabina tipo el Kordovo

La reĝo Henriko IIIa infor miĝinta pri la senkulpeco de la nobelulino kondamnis la edzon konstrui ĉi tiun turon sur la sama loko kie la perfida mortigo estis okazinta.

Tial ĝi estas nomata «Torre de la malmuerta» kio signi fas hispanlingve *de la malprave mortigita*.

Ĝi estis konstruita en la XVa jarcento, meze de la urba-
murego.

LA CALAHORRA

En la enirejo de la kvartalo *Campo de la Verdad* (Kampo de la Vero), kaj apudigita al la romana ponto, oni trovas tre tipan fortikaĵon de araba origino kiu, kiel la aliaj monumentoj pri kiuj ni jam parolis, estis transformigita kelkfoje pre-
cipe dum la regadoj de Henriko IIa kaj de la Katolikaj Reĝoj.

Ĝi konservas sian propran kaj severan karakteron, mal-
graŭ la transformigoj kiujn ĝi ricevis, kaj estas unu el la plej
interesaj monumentoj de Kordovo.

LA ALKAZAR'O

Malnova romana fortikaĵo transformigita de la araboj en
palaco; flanke de ĉi tiu palaco la reĝo Alfonso XIa konstrui-
gis en 1328 novan kristanan alkaŝaron kie, laŭ ĝenerala diro,
la Katolikaj Reĝoj projektis la almilidon de Granado. Kelkaj
jarojn poste estis ejo de la Sankta Servo de la Inkvizicio kaj
hodiaŭ ĝi servas kiel malliberejo kaj kiel kazino.

LA TRIUMFO

Kordovo havas kelkajn monumentojn dediĉitajn al
Sankta Rafaelo, sed oni povas certigi ke la plej interesa estas tiu
kiun oni konas per la nomo de «La Triunfo» lokita en la sa-
ma loko kie la episkopo Don Pascual starigis hospitalon en la
jarcento XIIIa.

Konstruis ĝin la francaj aristoj Mikaelo Verdiguier kaj
Baltasaro Grevelan dum la XVIIIa centjaro laŭ ordono de la
episkopo Martino de Barcia, kiu pagis la koston.

TURO DE SANKTA NIKOLAO

Estas ĉiu tiu turo tre belstila, mudeŝara, konstruita en la dekvina jarcento, unu el la plej belaj kiuj restas en Kordovo. La supra parto ne estas kiel la aliaj de la konstruaĵoj; oni sufermetis ĝin dum la XVIII jarcento sed malgrau la diferencoj la turo prezentas belan perspektivon havante kiel ornamoj malgrandajn arkojn kaj surturetojn.

Rilate al la bustoj kiujn oni vidas en ĝiaj muroj ekzistas kelkaj interesaj tradicioj



La fama pentristo Romero de Torres en interparolo kun siaj fratoj kaj niaj sam-anoj Antonio Luque (†) kaj F. Serrano Olmo

MUZEO DE PENTRAĴOJ

Estas en ĉi tiu muzeo rimarkindaj pentraĵoj de Petro de Córdoba, Zambrano, Castillo, Valdés Leal, Murillo, Zurbarán, Van Dick, Palomino kaj aliaj; ankaŭ belaj desegnaĵoj, kaj kelkaj statuoj de Inurria kaj Julio Antonio.

En departamento de ĉi tiu muzeo la eminenta pentristo Julio Romero de Torres havas sian studan laborejon.

MUZEO DE ARĤEOLGIO

En ĉi tiu muzeo estas interesaj restaĵoj de la arto de tiuj civilizacioj kiuj estas trapasintaj la landon.

La plej rimarkindaj estas la romanaj statuoj kaj la restaĵoj de araba ornamo; inter ĉi tiuj lastaj, kelkaj de la primitiva plafono de la moskeo.

RONDO DE LA AMIKECO, Kazino

En la jaro 1853 estis fondata ĉi tiu fama Rondo, uue el la plej rimarkindaj en Hispanio. Ĝi havas belegajn salonojn kun bonaj pentraĵoj, kaj ĉefan korton bele ornamitan laŭ ma nova stilo.

Ĝia granda salono estas 50 metroj laulonge kaj 14 laŭlarĝe kaj en ĝia ornamo oni trovas pentraĵojn kaj spegulonj grandvalorajn.

Krome ĝi havas tre bonan bibliotekon kun multaj gravaj volumoj.

LA ERMITEJOJ

Sur la plej granda altaĵo de la Kordova montaro oni trovas lokojn kie, kun la nomo de «Desierto de Nuestra Señora de Belén», estas 13 ermitejoj en kiuj loĝas monaĥoj.

La perspektivo kiun oni eltrovas de la loko nomita «Sillón del Obispo» (Seĝego de la Episkopo), estas vere belega. Oni vidas la tutan urbon kaj grandan parton de la kamparo.

MONAĤEJO DE SANKTA HIERONIMO


Tiu ĉi monaĥejo fondita en la jaro 1408 estas unu el la plej interesaj kiuj restas en la bela montaro de Kordova; ĝia fasado, laŭ la plej mirinda gotika stilo, kaj ĝia ogiva ĉirkaŭgalerio, havas grandan artan valoron.

Antaŭ mallonge ĝi estas renovigita kun la plej pura stilo la zorgo; tial ĝi konservas en ĉiom la detalojn de sia antikva epoko.

En tiu ĉi monaĥejo loĝis la kordovana kronikisto Ambrosio de Morales.

ALIAJ MIRINDAJ LOKOJ DE LA MONTARO

La plej belaj estas: «Huerta de los Arcos» (Bieno de la arkoj) konstruita laŭ araba stilo; la sanktejo de Sankta Dominiko, fondita de Sankto Alvaro en 1433, kaj tiu de la Sankta Virgulino de Linares de la jaro 1236.



Raul kaj Noemi

Pentraĵo de l' fama nuntempa pentristo kordovana
Romero de Torres

ALIAJ VIZITINDAJ LOKOJ

Pro iliaj diversaj meritoj estas vizitindaj la portalo de Sankta Hiacinto, la pordego de la ponto kaj la preĝejoj de Sankta Paŭlo, Sankta Marenino, Sankta Lorencio, Sankta Petro, Sankta Mikaelo, kaj pro iliaj kordovaj karakteroj la placoj de «la Doloroj» kaj de la «Sankta Fonto,» domo de Don Gome.



ORGANIZO ESPERANTISTA EN KORDOVO

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Honora membro

kaj Komitatano S-RO PABLO LINARES RAPET
San Bartolomé, 2.

Delegito S-RO FRANCISCO AZORIN IZQUIERDO
Claudio Marcelo, 18.

Vic-delegito S-RO FRANCISCO SERRANO OLMO
Ambrosio Morales, 10.

ESPERANTISTA GRUPO KORDOVA

Prezidanto S-RO JUAN SERRANO OLMO
Reloj, 1.

Adreso de la Grupo ĉe la prezidanto.

Kunvenoj ĉiujaŭde je la 2^a-3.^a postgm en la kafejo
Gran Capitán.

ESPERANTA LIBROVENDEJO KAJ INFORMEJO

Diego León, 8 (LIBRERÍA LUQUE).

KOMERCAJ ENTREPENOJ ESPERANTISTAJ - KORDOVO

Lardejo-Panfabriko

PASCUAL DE MIGUEL kaj Kompanio

Strato Lucano

Oleoj-Vinoj-Cerealoj-Lignoj

CARBONELL kaj Kompanio

Strato Angel de Saavedra

Poŝtkartoj kaj fotografaĵoj

VIDVINO LIÑÁN

Bajada del Puente (Apud la Moskeo)

Presejo-Livrovendejo-Ĉiuspecaj skribiloj

ROGELIO LUQUE

Strato Diego León, 8

Teksaĵoj ĉiuspecaj

ZAFRA POLO

Strato María Cristina, 19

Teksaĵoj pogrande kaj podetale

FRANCISKO HIERRO ARAGON

Stratoj Joaquin Costa kaj Rodríguez Marín

Vinoj

A. PEREZ BARQUERO

Strato Doce de Octubre

Agentejo de Negocoj

LA CALLE KAJ COLINET

Strato Marqués del Boi

Banco Popular de Córdoba

COOPERATIVA DE CRÉDITO

Gran Capitán, 36

Feraĵvendejo «La Campana»

JOSÉ MOLLEJA

Strato Claudio Marcelo

Hemiaĵoj ka farmaciaĵo Besoy

V. LOMBARDIA KAJ Kompanio

Strato San Pablo

Joseph Berger

Córdoba

Claudio Marcelo 18

Akceptas daŭran kaj konstantan raportadon kaj korespondadon por eksterlandaj ĵurnaloj kaj revuoj

Juveloj-Oro Arĝento-Juntaĵoj

«La Milagrosa» de FRANCISCO RUIZ RUIZ

Strato Enmedio

Komisioj por vinoj


P O Z O

Strato Reloj, 1

Komisioj-Reprezentacioj

F. SERRANO OLMO, sucesor de SERRANO Y OBREGON

Strato Ambrosio de Morales, 10



Hispanaj Esperantistoj!

ĈU vi estas abonanto kaj leganto de via nacia
esperanta gazeto

LA SUNO HISPANA?

Valencia

ĈU vi estas konstanta abonanto de la duonsemajna
jurnalo nur esperante verkita

HEROLDO DE ESPERANTO?

Horrem bei Koln, Germanujo

ĈU vi konas la sole beletristikan, multilustritan
monatan revuon

LITERATURA MONDO?

Budapest, Hungarujo

NE? Tiam tuj eksidu, skribu kaj

abonu!!!

Por Aŭtografoj

Por Aŭtografoj



GUÍA GENERAL DE CÓRDOBA

Editada por la Librería Luque.

Diego León, 8. Teléfono 614. — Córdoba.

Casa en Madrid: Magdalena, 1.

ES PROPIEDAD

PLANO DE CÓRDOBA

Escala = 1:15000

0 50 100 200 300 400 500 600 700 800 900 1000

NORTE




BARRIO OBRERO DE LA SOCIEDAD ESPAÑOLA DE CONSTRUCCIONES ELECTRO MECANICAS.

FERROCARRIL DE SEVILLA
TALLERES DE LA S.E.G.E.M.

FERROCARRIL DE MÁLAGA

PROYECTO DE ENSANCHE.



- 1 Capuchinas
- 2 Capuchinas
- 3 Casa de Ayuntamiento
- 4 Cister. Convento del
- 5 Encarnación. Conv. de la
- 6 Jesús Crucificado
- 7 Jesús Nazareno
- 8 Magdalena
- 9 N.ª S.ª de los Dolores
- 10 Padres de Gracia
- 11 Salvador
- 12 S. Andrés
- 13 S. Basilio
- 14 S. Francisco
- 15 S. Juan de los Caballeros
- 17 S. Pedro Alcántara
- 18 S. Rafael
- 19 S. Roque
- 20 S.ª Ana
- 21 S.ª Clara
- 22 S.ª Cruz. Conv. de
- 23 S.ª Isabel
- 24 S.ª María de Gracia
- 25 S.ª María. Conv. de
- 26 S.ª Victoria
- 27 Pal. de Justicia